katolika sento

12

JARO 54a U.E.C.I.



KATOLIKA SENTO
BOLLETTINO DELLA
UNIONE ESPERANTISTI
CATTOLICI D'ITALIA
(U.E.C.I.)

Anno 54° - 1975

Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (MI)

Redattore per la
Voce Esperantista di Roma:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA
Poŝtĝirkonto 1-37638

Redattore
del Bollettino U.E.C.I.:
SIG. GLAUCO CORRADO
Via Palmanova 28
20132 MILANO

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO
Poŝtĝirkonto 3-7791

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

ABONKOTIZON
AL KATOLIKA SENTO
SACERDOTOJ POVAS PAGI
ANKAŬ PER CELEBRO
DE DU S. MESOJ,
PRI KIUJ ILI BV. INFORMI
P. JACOBITTI
AŬ PASTRO DUILIO MAGNANI
VIALE C. ZAVAGLI 73
RIMINI

Quota di abbonamento L. **2500**

Abonkotizo italliroj **2500**

KATOLIKA SENTO

nº 12

54a Jaro Decembro 1975

MESAGO DE LA PAPO POR LA TUTMONDA TAGO DE LA PACO (1ª de januaro 1976)

LA VERAJ ARMILOJ DE LA PACO JE LA SERVO DE LA NOVA HOMARO

Al vi, Ŝtatestroj!

Al vi, Reprezentantoj kaj Iniciatintoj de la grandaj internaciaj Institucioj!

Al vi, Politikistoj! Al vi, Studuloj de la problemoj pri la internacia kunvivado, Publicistoj, kaj Agantoj , kaj Sociologoj, kaj Ekonomikistoj pri la rilatoj inter la Popoloj.

Al vi, Civitanoj de la mondo, fascinataj de la idealo de universala frateco, aŭ seniluziiĝintaj kaj skeptikaj koncerne la eblecon starigi inter la Gentoj rilatojn de ekvilibro, de justeco, de kunlaborado!

Kaj fine al vi, sekvantoj de Religioj favorantaj amikecon inter la homoj; al vi, Kristanoj, al vi, Katolikoj, kiuj el la paco en la mondo konsistigas la principon de via kredo kaj la celon de via universala amo!

Al vi Ni kuraĝas ankaŭ en ĉi tiu jaro 1976 respekte nin prezenti, kiel en la antaŭaj jaroj, kun nia mesaĝo de Paco.

Invito ĝin antaŭas: ke vi aŭskultu ĝin: estu afablaj, estu paciencaj. La granda problemo de la Paco meritas vian aŭskultadon, vian pripensadon, eĉ se povas ŝajni, ke nia voĉo ripetiĝas pri ĉi tiu temo reaperanta ĉe la komenco de la nova jaro; kaj eĉ se vi, instruitaj per viaj studoj kaj, verŝajne pli multe, per viaj spertoj, opinias koni jam ĉion pri la Paco en la mondo.

Eble, tamen, povas havi iun intereson por vi ekkoni, kiaj estas niaj spontaneaj sentoj, baziĝantaj sur la

instruoj de la historio, en kiu ni estas tute mergitaj, koncerne ĉi tiun senindulgan temon pri la Paco.

Niaj unuaj sentoj tiurilate estas du, kaj malakordaj inter si. Antaŭ ĉio ni vidas kun plezuro kaj kun espero la evoluon de la ideo pri la Paco. Ĝi gajnas gravecon kaj dimencion en la konscienco de la homaro; kaj kun ĝi disvolviĝas la strukturoj necesaj por la organizado de la Paco; multobliĝas la celebradoj responde caj kaj akademiaj favore al ĝi; la moroj evoluas laŭ la senco indikita de la Paco: vojaĝoj, kongresoj, kunvenoj, komercaj interŝanĝoj, studoj, amikecoj, kunlaboradoj, helpoj... La Paco gajnas terenon. La Konferenco de Helsinko en julio-aŭgusto de 1975 estas okazaĵo, kiu bone esperigas tiurilate.

Sed bedaŭrinde ni vidas, samtempe, ekfirmiĝi fenomenoj kontraŭaj al la enhavo kaj al la celo de la Paco; kaj ankaŭ tiuj fenomenoj progresas, eĉ se ofte ili restas je latenta stato, sed kun nedubeblaj simptomoj de komenciĝantaj aŭ estontaj konfliktoj. Renaskiĝas, ekzemple, kun la nacia sento, prava kaj dezirinda esprimo de la multobla komunumo de iu Popolo, la naciismo, kiu, akcentante tiun esprimon ĝis formoj de kolektiva egoismo kaj de ekskluzivema antagonismo, reaperigas en la kolektiva konscienco ĝermojn danĝerajn kaj eĉ minace potencajn de rivalecoj kaj de tre probablaj konkuradoj.

Kreskas senmezure - kaj la ekzemplo timtremigas - la provizado de armilaroj ĉiuspecaj, en ĉiu Nacio. Ni havas pravigitan suspekton, ke la komerco de armiloj atingas ofte rekordajn nivelojn sur la internaciaj merkatoj, laŭ la jena obseda sofismo: la defendo, eĉ se ĝi estas projektita kiel simple hipoteza kaj potenciala, postulas kreskantan konkuradon de armadoj, kiuj nur en sia kontraŭstara ekvilibro povas certigi la Pacon.

Sed ne estas kompleta la listo de la nebonaj faktoroj korodantaj la stabilecon de la Paco. Ĉu Ni povas nomi paca mondon radikale dividitan de nefleksebla ideologioj, fortege kaj kruelege organizitaj, kiuj dividas inter si la Popolojn, kaj, post liverado de libereco, disigas ilin, interne de iliaj tutaĵoj, en klikojn, en partiojn, kiuj trovas motivon de ekzisto kaj de agado en la venenado de siaj aroj pere de nevenkebla malamo kaj pere de sistema lukto en la interno mem de la socia strukturo? La ŝajna normaleco de tiaj politikaj situacioj ne kaŝas la streĉon de respektiva fortokonkuro preta por disbati la kontraŭulon tuj, kiam tiu malkaŝas signon de fatala malforto. Ĉu tio estas Paco? Ĉu tio estas civilizo? Ĉu estas Popolo iu kunaĵo de civitanoj, kontraŭaj unuj al la aliaj ĝis la ekstremaj sekvoj?.

Kaj kie estas la Paco en la fajrujoj de armitaj konfliktoj, verŝajne detenataj nur de la senpoveco de pli senbridaj eksplodoj? Ni sekvas kun admiro la klopodojn farijajn por estingi ĉi tiujn fajrujojn de militoj kaj geriloj, kiuj de multaj jaroj malfeliĉigas la terglobon, kaj ĉiumomente minacas eksplodi al gigantaj luktoj en la dimensioj de kontinentoj, de rasoj, de religioj, de sociaj ideologioj. Sed Ni ne povas kaŝi al Ni la malfirmecon de Paco, kiu estas nur paŭzo de jam ekvidiĝantaj estontaj konfliktoj, nome la hipokriteco de iu trankvilo, kiu difiniĝas paca nur per malvarmaj vortoj de ŝajnigata respektema reciprokeco.

La Paco, Ni tion agnoskas, en la historia realo postulas daŭran kuracadon; ĝia farto estas, laŭ propra naturo, nefirma, ĉar ĝi estas kunaranĝo de rilatoj inter homoj arogantaj kaj nekonstantaj; ĝi postulas daŭran kaj saĝan strebadon de tiu krea arto, kiun oni nomas diplomatio, internacia ordo, dinamismo de la intertraktado. Kompatinda Paco! Kiaj, do, estas viaj armiloj? Ĉu

la timego de nekredeblaj kaj fatalaj konfliktegoj, kiuj povus dekumi aŭ eĉ preskaŭ neniigi la homaron? Ĉu la rezignacio al iu stato de suferata subpremo, kiaj estas la koloniismo aŭ la imperiismo, aŭ la revolucio, kiu el furioza fariĝis nekontraŭstareble senmova kaj terure daŭrema? Ĉu la armadoj antaŭzorgaj kaj sekretaj? Ĉu organizo kapitalisma, nome egoisma, de la ekonomia mondo, kiun la malsato devigas al teniĝo submetita kaj trankvila? Ĉu la narcisisma sorĉo de historia kulturo, malhumila kaj konvinkita pri siaj ĉiamdaŭraj triumfaj destinoj? Aŭ ĉu la belegaj strukturoj, aranĝitaj cele al raciigo kaj organizado de la internacia vivo?

Ĉu estas sufiĉa, sekura, fekunda, feliĉa iu Paco starigita nur sur tiaj fundamentoj?

Estas necesa io plia. Jen nia mesaĝo. Antaŭ ĉio necesas doni al la Paco aliajn armilojn, anstataŭ tiuj destinitaj mortigi kaj neniigi la homaron. Estas necesaj precipe la armiloj moralaj, donantaj forton kaj prestiĝon al la internacia juro; antaŭ ĉio tiuj pri observado de la paktoj. 'Pacta sunt servanda' estas la aksiomo ankoraŭ valida por la konsisto de la efektiva interparolo inter la Statoj, por la stabileco de la justeco inter la Nacioj, por la honesta konscienco de la Popoloj. La Paco uzas ĝin kiel ŝildon. Kaj se la Paktoj ne spegulas la justecon? Jen, tiam, la apologio de la novaj internaciaj Institucioj, perantoj de konsultadoj, de studoj, de decidoj, kiuj devas nepre ekskluzivi la eksplodon de fortoj blindaj kaj senbridaj, kiuj ĉiam kuntrenas homajn viktimojn kaj sennombrajn senkulpajn ruinojn, kaj malofte atingas la veran celon: depostuli efektive aspiron vere justan. La armiloj, la militoj unuvorte, estas forigendaj el la programoj de la civilizo. La prudenta malarmado estas alia ŝirmilo de la

Paco. Kiel diris la profeto Jesaja: "Li juĝos inter la gentoj kaj arbitracios inter multaj popoloj. Ili forĝos el siaj glavoj plugilojn, el siaj lancoj rikoltilojn" (Jes. 2,4). Kaj ni aŭskultu la Vorton de Kristo: "Remetu vian glavon en ĝian ingon; ĉar ĉiuj, kiuj uzos la glavon, per glavo pereos" (Mt. 26,52). Ĉu utopio? Dum kiom da tempo plu?

Ĉi tie ni eniras en la kampon eble estontan de la idea homaro, de la homaro nova, generota, edokota; de la homaro senigita je siaj pezegaj kaj mortigaj militistaj armiloj, sed tre pli vestita kaj fortigita de enradikiĝintaj principoj moralaj. Tiuj principoj jam ekzistas en la stato teoria, sed ili estas praktike infanaj, ankoraŭ malfortaj kaj gracilaj; ili nur komencis penetri en la konsciencon profundan kaj agantan de la Popoloj. Ilia malforteco, kiu ŝajnas nesanigebla al la diagnozistoj - kiujn oni nomas realismaj - de la studoj historiaj kaj antropologiaj, venas precipe de la fakto, ke la militista malarmado devus esti komuna kaj ĝenerala, por ne konsistigi nepardoneblan eraron, sekvon de neebla optimismo, de blinda naiveco, de ekscita okazo favoranta la perforton de la aliaj. Aŭ la malarmado estas de ĉiuj, aŭ ĝi estas krimo de nedefendo: ĉu, en la homa kunvivado historia kaj konkreta, la glavo ne havas sian ekzistopravigon por la justeco, por la paco? (vd. Rom.13,4). Jes; ni devas tion akcepti. Sed ĉu ne eniris en la mondon transforma dinamismo, espero ne plu verŝajna, progreso nova kaj efektiva, historio estonta kaj revata, kiu povas iĝi ĉeestanta kaj reala, de kiam la Majstro, la Profeto de la Nova Testamento proklamis la dekadencon de la vivmaniero arkaika, primitiva kaj instinkta, kaj anoncita per vortoj, havantaj en si povon ne nur por denunci kaj anonci, sed por generi, je difinitaj kondiĉoj, novan homaron? Jen liaj vortoj: "Ne pensu, ke mi venis por detrui la Leĝon aŭ la Profetojn; mi venis ne

por ilin detrui, sed por ilin kompletigi... Vi aŭdis, ke estis dirite al la antikvuloj: Ne mortigu; kaj tiu, kiu mortigos, estos submetita al juĝado. Kontraŭe mi diras al vi: ciu, kiu koleras kontraŭ sia frato, meritas esti juĝata..." (Mt. 5, 17, 21-22).

Tio ne plu estas simpla kaj naiva kaj danĝera utopio. Ĝi estas la nova Leĝo de la homaro, kiu progresas kaj armas la Pacon per neaŭdita principo: "Vi ĉiuj estas fratoj" (Mt. 23,8). Se la konscio pri la universala frateco vere penetros en la koron de la homoj, ĉu ili ankoraŭ bezonos sin armi ĝis ili fariĝos blindaj kaj fanatikaj mortigantoj de fratoj, per si mem senkulpaj, kaj efektivigi, omaĝe al la Paco, buĉadojn je senekzempla potenco (kiel en Hiroshima, la 6an de aŭgusto 1945)? Cetere, ĉu nia tempo ne havis ekzemplon pri tio, kion povas fari malforta Homo, armita nur per la principo de ne-perforto; Gandhi, por elaĉeti Nacion kun centoj da milionoj da homoj al la libereco kaj al la digno de nova Popolo?

La civilizo antaŭeniras sekvante Pacon armitan nur per olivarba branĉo. Post ĝi sekvas la Doktoroj kun la pezaj volumoj pri la evoluema Juro de la ideala homaro; sekvas la Politikistoj, spertaj ne tiom pri la kalkulado de la armeoj necesaj por gajni militojn kaj submeti homojn venkitajn kaj deprimitajn, sed spertaj pri la helprimedoj de la psikologio de la bono kaj de la amikeco. Ankaŭ la justeco sekvas la serenan irantaron; ĝi ne plu estas fiera kaj kruela, sed zorganta nur defendi la malfortulojn, puni la senbridulojn, certigi iun ordon, ekstreme malfacilan, sed la unikan, al kiu povas esti atribuata tiu dia nomo: la ordo en la libereco kaj en la devo konscia.

Ni ĝoju; tiu irantaro, eĉ se ĝenata de obstinaj atakoj kaj de neatenditaj incidentoj, antaŭeniras sub niaj okuloj, en ĉi tiu tragika tempo, kun paŝo, verŝajne iom malrapida, sed firma kaj bonfara por la tuta mon-

do. Ĝi estas irantaro senhezita en la uzado de la ve - raj armiloj de la paco.

Ankaŭ ĉi tiu mesaĝo devas havi sian aldonon por la sekvantoj de la Evangelio, en propra senco kaj je ĝia servo. La aldono memorigas, kiom Kristo, nia Sinjo - ro, estas klara kaj postulema pri tiu temo de la paco, paco senigita je ĉiu instrumento, kaj armita nur per boneco kaj amo.

La Sinjoro alvenas al asertoj, kiel ĉiu scias, kiuj ŝajnas paradoksaj. Ne estu al ni malplaĉe trovi en Evangelio regulojn de Paco, kiun ni povus nomi "rezigne-ma". Ni memoru, ekzemple: "Se iu volas procesi kontraŭ vi por forpreni vian tunikon, lasu al li ankaŭ vian mantelon" (Mt. 5,40). Kaj ĉu tiu malpermeso de venĝo ne malfortigas la Pacon? Ĉu ĝi eĉ ne pligravigas anstataŭ defendi la kondiĉon de la ofendito? "Se iu frapas al vi la dekstran vangon, turnu al li ankaŭ la maldekstran" (Samloke, 39). Sekve, ne estu reprezalioj, ne estu venĝoj (precipe se ili estas farataj antaŭzorge kontraŭ ofendoj ne ricevitaj!). Kiom da fojoj en la Evangelio estas al ni rekomendata la pardono, ne kiel ago de poltrona malforteco, nek de rezigno antaŭ la maljustaĵoj, sed kiel signo de frata karitato, starigita kiel kondiĉo, por ke ni mem ricevu la pardonon, tre pli grandaniman kaj por ni necesan, fare de Dio!(v. Mt. 18,23; 5,44; Mr. 11,25; Lk. 6,37; Rom. 12,14;KTP.).

Ni memoru la sindevigon, kiun ni prenis por la indulgenco kaj por la pardono, kiujn ni petegas de Dio en la "Patro nia", metante la kondiĉon kaj la mezuron de la dezirata mizerikordo: "Pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ni pardonas al niaj ŝuldantoj" (Mt. 6,12).

Do, ankaŭ por ni, skolanoj de Kristo, ĉi tio estas leciono ankoraŭ primeditenda, aplikenda kun fidema ku

raĝo.

La Paco firmiĝas nur per la paco, tiu, kiu ne estas disigebla de la postuloj de justeco, sed kiu estas nutrata de sinofero, de indulgemo, de mizerikordo, de karitato.

tr.C.M.-P.M.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

NIAJ SCIIGOJ

ABONIS K.S.-on 1976: Albano L.(Romo): Del Pio C.; Frascati (Romo): Urbajtis P.; MontePorzio C. (Romo): Minio Paluello T.; Padovo: Minnaja C.; Pescia: Valleggi C.; Rho (MI): Minnaja N.; Romo: Bizzoca M.; Christiaens J.; Di Tocco V.; De Salvo A.; Minio-Paluello C.M.; E.P.Puracchio; Tropea (Cz) Coccia-T.G.; Aŭstrujo: Sagan V.; Belgujo: Rosada G.; Germanujo: Zimmerer H.; Hispanujo: Armelles J. Hungarujo: Vàgò I.; Norvegujo: Murak St.; Pollando: Pola K.U.E.:40; Kudzik T.; Marŝalek J.; Zawada J.; Pytlewicz B.; Nowakowski T.; Klopocka Z.; Sygnarski M.; Kropiewnicki J.; Massalska H.; Gucwa A.; Krzan M.; Boklak D.

KATOLIKA SENTO 1976

Abonkotizo: en Italujo It. Liroj 1.500
ekster Italujo " 2.000

La abonkotizo por K.S. estas, kompare kun tiuj de ĉiuj aliaj periodaĵoj, tre malalta. Niaj legantoj bonvolu tuj renovigi la abonon, ĉar ni haltigos la sendadon de K.S. al la nepagintoj depost la unua numero de la nova jaro. Kaj, ĉar ni presigas la revuon nur laŭ la postulita kvanto, ne plu restas, kutime, ekzemploj por la malfruaj petintoj.

La nova "KATOLIKA PREĜARO" estas havebla ĉe ni, por 1.000 liroj.
Mendu senprokraste!

GRAVA ATENTIGO!
Kiel ni jam anoncis, ni decidis disdoni la restintajn ekzemplerojn de la rava romano "La Sklavoj de Dio". Pro tio ni ĝin liveros, ĝis elĉerpiĝo de nia stoko, por £. 1.500 anstataŭ 2.700. Profitu rapide la okazon, kaj aĉetu ilin por vi kaj por ĉiuj viaj esperantistaj amikoj!

JUVELO DE LA ESPERANTA muzika literaturo estas la Muzilo-Kajero n°4 de prof. Paruzel. Jen ĝia enhavo: Enkonduko latine-esperante - Ekumenaj kantoj - Psalmoj - Advento - Kristnasko - Fastotempo - Paskotempo - Pente-

kosto - Eŭkaristiaj kantoj - Mari-kantoj - Antaŭ la altaro - Anĝela meso - Reĝa meso - Rekviema meso - Kristo venkas -
La grandformata kajero (20,5x29 cm) 76-paĝa, superba eldono presita en Nederlando, manku al neniu privata esperantisto, artamanta kaj al neniu esperanta aŭ neesperanta biblioteko!

Prezo: 1. 1.500 Mendu tuj de ni!

RIMARKU
Per poŝtaj afrankoj de ĉi tiuj libroj bv. aldoni £. 150 en Italujo aŭ 200 ekster Italujo; kaj £. 200 por registrado.

POR TIUJ, KIUJ ANKORAŬ ne konis la esperantan volumon "Sklavoj de Dio", de Géza Gàrdonyi, klasika hungara verkisto, majstre esperantigitan de d-ro J. B. Hamvai, ni prezentas ĉi tie du paĝojn de la belega romano, por ke oni povu havi ideon de ĝia mirinde alloga vervo.

..."La sekvantan printempon apenaŭ eksekiĝis ankoraŭ la tero, kiam la virino prenis fosilon, rastilon el la kamero.

- Venu, mia Jancsi, - ŝi diris, - prenu tiun rastilon! Oni vidu, ke la ĝardeno estos same prilaborata, ki el kiam via kompatinda patro vivis.

Dik-braka, rondeta virino estis la vidvino. Forti -

Dum la inaŭguro de la 36a IKUE-Kongreso: la estraro

Parta vidaĵo de la Asembleo

kajn krurojn ŝi havis kaj fortajn ŝultrojn. Ili ambaŭ ĉiam manĝis, do ne mirinde, ke grasaj ili estis. En la domo de la preposto ĉiu estis grasa. Nur la preposto estis malgrasa. Sed la preposto vivis en Buda, plej ofte ĉe la reĝo.

Kiam ili komencis sian laboron, aperis sinjoro Lukàcs, la skribisto de la preposto, en la ĝardena pordo. Turtokoloran mantelon li portis, ĉeflanke glavon, sur la kapo enpremitan, blankan ĉapon el ŝafidfelo.

- Virino - li alparolis ŝin digne, - ĉesigu la fosadon! De nun ne tio estos via laboro. - Ĉar dignoplena homo estis sinjoro Lukàcs kiel la meleagro, kvankam nur hejme, ĉe la domo de la preposto. En Buda eĉ la meleagro ne estis dignohava. La vero estas ja, ke en tiuj tempoj troviĝis meleagro nek en Buda, nek en Fejèrvàr kaj nenie en Eŭropo. Sed la meleagrodigna sinjoro Lukàcs regadis la servistaron. Li ordonis: kiu laboru en la farmo, kiu en la urbo. Tiutempe la servistoj estis ankoraŭ servutuloj.

La virino paliĝis, eĉ la buŝrando al ŝi blankiĝis. Time kaj humile ŝi rigardis al la skribisto. Ŝin ektimigis la penso, ke oni forigos ŝin el la domo de abundo al iu malgrasa farmo.

- Kolektu viajn ĉiaĵojn, - ordonis plu sinjoro Lukàcs, - fosilon, pioĉon, rastilon! Mia sinjoro ordonas, ke vi venu morgaŭ al Buda, al la Insulo.

- Al la Insulo? - balbutis la virino.

- Tien. La reĝo konstruigas monakinejon tie. Ties ĝardenon vi kulturos, plantos. Kiam la monakinoj estos enlokiĝintaj, ĉio verdu ene!

La meritplena viro sin turnis for de la rigidiĝinta ĝardenistino.

Sed meze de la korto li haltis, turniĝis, revenis.

- Julis, - la sinjoro preposto ordonas ankaŭ tion, ke vi kolektu ĉiaspecajn semojn, radikojn, arbetaĵojn kaj

ĉiajn ĝardenajn bonaĵojn! Vi scias, kio troviĝas kie. Morgaŭ matene vi veturos per ĉevaljunga ĉaro al Buda.

La virino premis la kapon inter la du manplatojn. Kion ŝi faru unue? Tiam ŝia rigardo turniĝis al la filo kaj indigniĝinte ŝi rimarkis, kiom elkreskis la hartu - fo de la knabo kaj kiel hirta li estas.

- He, vi malorda sentaŭgulo! - ŝi kriis. - Tiel vi vo las iri antaŭ la reĝon? Tuj elportu la tondilon kaj seĝon!

La knabo ruĝiĝinte foriraĉis por seĝo, tondilo. Jam nun li sentis, kvazaŭ antaŭ la reĝo li starus. La virino prenis de la tero ne malgrandan forpoton. Ŝi premis la ujon sur la kapon de la filo ĝis la oreloj kaj sub ĝi tondis lian hararon.

Jancsi malmulte dormis tiun nokton. Neniam li estis en Buda. Nur el fabeloj li aŭdis, ke tie loĝas la reĝo. Iu fabelo rakontis ja tion, kiel ekamikiĝis la kampulido kun la reĝidino. Certe, tiam la kamparanfilo surhavis novan peltmantelon. Alia fabelo rakontis, ke oni devus trasdoni la reĝidinon al la drako, sed iu brava junulo liberigas ŝin kaj poste okazas granda nuptofesteno.

Sonĝis Jancsi pri oro, arĝento, pri kronhavaj viroj kaj virinoj kaj pri peltmanteloj, ĝis mateno".

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

Memorigante Sacerdoton Ferdinando Longoni

La forpaso de nia amata Prezidanto, "Don" Ferdinando Longoni (24.X.'75), pri kio ni anoncis en la ĵus pasinta numero, lasis meze de nia Asocio tian malplenon, ke ankoraŭ ni ne kapablas mezuri ĝian vastecon. Nur ni povas nun, eĉ pli ol antaŭe, konstati kiom li estis la ga

rantio de ĝia stabileco, la subteno de nia movado, la kuraĝiganto, la akcelanto, la modelo de nia agado.
Por ia, kvankam malgranda konsolo al niaj katolikaj samideanoj, ni volas diskonigi kelkajn liajn deklarojn, kiujn li volis lasi al ni kvazaŭ testamente:

"Mi ĉiam volis esti fidela al la romkatolika kredo, al la Papo, kaj al mia Episkopo, de kiuj mi petas memorigan preĝalvokon al Dio por mi.

Sur mia tombo skribu, post mia nomo, nur ĉi tiun epitafon:

Pro la dia mizerikordo mi estas pastro,
pro mia malforteco mi estas pekulo:
preĝu por mi.

Mi ne povas malpermesi, ke oni faru pri mi funebran paroladon. Sed oni reliefigu, ke la pastroj pli ol aliaj ricevis de Dio, kaj pli ankaŭ ili respondas antaŭ Li.

Oni ankaŭ diru, ke mi pardonpetas, ĉar pro mia karaktero mi eble koliizis kun multaj: sed neniam mi faris tion intence. Mi mem elkore pardonas al tiuj, kiuj pro ia miskompreno, eble koliziis kun mi.

Sed unue oni certigu, ke mi ĉiujn amis, sacerdotojn kaj fidelulojn, kiuj estis al mi konfiditaj, kaj ke ĉiu mia iom severa interveno, ĉiam estis farita pro amo.

Oni ankaŭ konfirmu, ke mi ĉiam estis malriĉa kaj ke mi nenion apartigis por mi. Sed ĉion mi elspezis por la preĝejo kaj la Eklezio. Tiuj, kiuj asertis la malon, profunde suferigis min. Sed mi elkore pardonas ankaŭ al ili, ĉar ili ne estis ĝuste informitaj pri mi".

(El testamento de Sac.F.Longoni)

LA STARIGO DE LA CENTRA OFICEJO de IKUE en Romo estis lia lasta deziro. Li skribis al Don Duranti pri tio, kelkajn tagojn antaŭ sia morto:
"...Unue mi dankas vin pro via valora kunlaboro kaj pro la donaco farita al IKUE de sidejo en Via Berni. Mi ne vidis ĝin; oni diris al mi, ke ĝi ne estas tro granda, sed ke ĝi estas sufiĉa por reprezenti IKUE-n kaj porti ĝian adreson. Tre grave estas posedi sidejon en Romo (por katolikoj tio estas la optimumo), kaj ke ĝi estas io stabila, ne ligita al la provizoreco de sekretarioj Ĝi fariĝos stabila pivoto, ĉirkaŭ kiu vasta organizamovado kapablos turniĝi".
Kaj kiam oni petis lin pri oficiala atesto de la sidejo de IKUE, por obteni de la poŝta administracio la rajton malfermi poŝtĝirkonton en Romo, li jam de la 13a de septembro deklaris (itallingve):
"Oni atestas, ke la Itala Katolika Esperantista Unuiĝo (IKUE) fiksis sian sidejon en Romo, en via Berni, n.9; kaj pro tio ni petas malfermi Poŝtĝirkonton en Romo , laŭ ĉi tiu adreso:

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista
I.K.U.E.-Centro
00185 Romo, Via Francesco Berni -

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

POR VIAJ BONDEZIROJ PETU de ni la belan serion da bildkartoj de nia 36a IKUE-kongreso en Romo. Tiel vi donos duoblan ĝojon al la adresitoj:

5 serioj (30 bildkartoj) £. 450

EKDE LA MALRIĈAJ BETLEHEMAJ paŝtistoj ĝis la Reĝoj venintaj el Oriento vizitante la dian Infanon, ĉiuj portis al Li donacojn. Ĉu vi ankaŭ ne volus esprimi la ĝojon de la savo, donante al Li, en la persono de niaj

malriĉuloj, vian helpon?
Ĉar ni kutimas, per nia Bonfara Kaso (B.K.) transdoni en ĉi tiu soleno helpon de niaj gesamideanoj, vi povas sendi vian monoferon al nia poŝtĝirkonto, aŭ al nia Conto Corrente Postale n° 1/37638 - P. Giacinto Jacobitti - Piazza S.Maria Maggiore, 8 - 00185 Roma - Italujo.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

Ni ricevas de Rimini kaj kun plezuro ni raportas:

COSTITUZIONE GRUPPO U.E.C.I. "PADRE E.M.CAROLFI" IN RIMINI

Il 15 ottobre 1975 si è costituito in Rimini presso il C.E.R. (Centro Esperantista Riminese diretto da Padre Albino Ciccanti), il Gruppo U.E.C.I. che ha già 16 aderenti.
Tale iniziativa vuole essere anche un segno di stima e di riconoscenza a P.Albino Ciccanti, Presidente Nazionale U.E.C.I., per il suo più che decennale lavoro esperantista in Rimini.
In omaggio all'instancabile opera del Pioniere Esperantista Padre Eugenio Modesto Carolfi, i Soci hanno voluto dedicare il Gruppo alla sua memoria.
Il primo passo del nuovo Gruppo è stato quello di presentarsi ufficialmente al Vescovo Diocesano, S. Ecc. EMILIO BIANCHIERI il quale, approvando la formazione del Gruppo stesso, si è compiacuto di rilevare come diverse iniziative esperantiste si siano già attuate nella Diocesi Riminese; ultima fra le altre, la " Fratarenkontiĝo" del Clero diocesano con una trentina di esperantisti dell'Est Europeo.

Il Gruppo si propone:

1) - La formazione esperantista e cristiana dei componenti (letture bibliche in esperanto e commento - celebrazione comunitaria della S.Messa in esperanto.

2) - Presenza articolata nelle strutture diocesane (contatto con il clero - con Istituti religiosi - movimenti laicali, ecc.).

3)- Collaborazione attiva col C.E.R. (Mostre - Corsi - Organizzazione).

Sono stati eletti dirigenti:
Presidente: Piersanti Alfredo; Assistente: Don Duilio Magnani; Vice Presidente: Boga Carla; Segretaria: Ceccarelli Caterina ved.Maccari; Cassiera: Scaparrotti Lucia; Sindaco revisore dei conti: Cambuti Antonio; Incaricato Ragazzi: Frisoni Mauro.

L'esempio di Roma ha portato i suoi frutti. Ci auguriamo che in tutta l'Italia sorgano nuovi gruppi UECI per costituire, in seno alla Chiesa, un Movimento di massa a favore dell'esperanto come mezzo di unità e di intercomunicazione tra i cristiani.

Al la naskiĝinta UECI-sekcio de Rimini, al ĝia estraro kaj al ĉiu el ĝiaj 16 unuaj socianoj, la Roma Esperantista Grupo donas aplaŭdojn kaj bondezirojn.

El la Katolika Eklezio

LAŬ LA STATISTIKA Jarlibro de la Eklezio, publikigita dum ĉi tiuj tagoj, el la tutmonda loĝantaro, kalkulita je la 31a de junio laŭ 3.804 milionoj, la katolikoj baptitaj estis 695 milionoj, nome 18,3 procentoj. Por ili zorgis 414.000 sacerdotoj (preskaŭ 6 por 10.000 fideluloj), en 320.000 parokoj aŭ kvazaŭ-parokoj. La plej alta nombro de la katolikoj apartenas al la du Amerikoj: 61 por 100 loĝantoj. Sekvas Eŭropo, kun 40 procentoj, kaj Oceanio kun 24 p.c. La plej malalta proporcio apartenas al la Azio, kun 2,5 p.c.

GREKOKATOLIKA EKLEZIO EN ĈEĤOSLOVAKIO.

La grekokatolika (g.k.) aŭ uniata Eklezio, kiu devenas ekde la kontrakto en Brest en la dekoka jarcento, ekzistas precipe en la orienta parto de la ĉeĥoslovaka respubliko. Ĝia episkopejo estis en la slovaka urbo Presov kaj en ties ĉirkaŭaĵo estis la plimulto da eklezianoj.

La g.k. Eklezio havas ceremoniojn kaj ritojn oldslavajn, tradukitajn el la greka lingvo, sed aliĝas al la Papo kiel al la estro de kristanoj. La ceremonioj kaj ritoj do estas analogiaj al la ortodoksa liturgio, sed la diferenco inter la ortodoksa kaj g.k. religio estas la sinteno al la Papo. La g.k. Eklezio reunuiĝis (laŭ la romkatolika esprimo) kun la ĝenerala katolika Eklezio post la granda skismo en 1054, sed konservis kelkajn diferencojn en la liturgio.

Sed ofte oni konfuzas la g.k.-n Eklezion kun la koncerna ortodoksa, ĉar la ortodoksaj Eklezioj estas en la diversaj ŝtatoj tute memstaraj, dum la ĉefa distingo de la g.k. Eklezio estas la aliĝo al la Papo. Tamen ĉi tiu Eklezio evoluas memstare kaj la sacerdotoj de la a

lia tipo aperas en la preĝejoj de grekokatolikoj nur escepte kaj pli eble kiel gastoj. Ĉi tiu Eklezio ekzistas ne nur en Ĉeĥoslovakio, sed ankaŭ en Polio kaj en la okcidentaj partojde USSR. Kaj kiam Hungario okupis parton de Ĉeĥoslovakio en 1938 kaj 1939, ĝi ekzistis ankaŭ en Hungario. Krome malgrandaj komunumoj de la g.k. Eklezio estas ankaŭ en Rumanio, Jugoslavio kaj Bulgario.

Post la dua mondmilito la plimulto de la teritorioj, kie estis la g.k. Eklezio, transiris al USSR kaj tie en 1946 oni "solene proklamis la nuligon de la unio" kaj transiris (aŭ revenis) al la ortodoksa Eklezio. En Polio, do, estas vere nur tre malgrandaj restoj, sed en Ĉeĥoslovakio la Eklezio ekzistis plu. Sed en 1950 oni kulpigis la tutan g.k.-n Eklezion, ke ĝi subtenis la komplotintojn kontraŭ la ŝtato, precipe la bandojn de ukrainaj naciistoj, kiuj en 1946-1949 transiris la ĉeĥoslovakan ŝtaton, tielnomatajn Bandera-trupojn. Tial la episkopo de la Eklezio estis kondamnita, kaj la religianoj iĝis (praktike per ŝtata dekreto) anoj de la ortodoksa Eklezio. La episkopo mortis en malliberejo, kaj same multaj pastroj katolikaj. En 1968 oni malagnoskis la akuzon kontraŭ la g.k. Eklezio, kaj ĝi reakiris ian liberecon.

Sed post la nova estrado de la ŝtato en 1969 oni preferas silenti pri la tuta problemo, kiel cetere pri ĉiuj religiaj problemoj. Do, la g.k. E. ekzistas, eble vivetas, sed ĝi estas limigita nur al la orienta parto de la lando; aliloke oni malmulte scias pri ĝi kaj oni devas klopode serĉi informojn pri ĝi. Tial oni ne scias, ĉu ekzistas iu, kiu funkcias kiel episkopo; fakte nova episkopo ne estis elektita. Pri la Eklezio ekscias nur tiu, kiu tre serioze okupiĝas pri tio kaj serĉas informojn rekte en la loko.

Dum la unua respubliko oni jam organizis en romkato-

likaj preĝejoj "tagojn de la oldslava liturgio". Diversaj lokoj en tiu lando havis privilegiojn, ke oni tie legis la sanktan meson laŭ la oldslava rito. Tio estas la heredaĵo de la historio, ĉar en 863 tie disvastiĝis la slava liturgio, kiu poste estis anstataŭigita per la roma liturgio; sed kelkaj "insuloj" restis, ekzemple monakejo en Sàzava, ĝis la dekdua jarcento; poste la katedralo en Prago (Emauzy), fondita de Karolo la Kvara en la dekkvara jarcento. Kompreneble al tiu ĉi heredaĵo aliĝas ĉiuj ceteraj Eklezioj, sed ne la grekokatolika, kiu estas limigita al la orienta Slovakio, ĉar tio ja estas en ĉeĥaj landoj. Kaj tie estas la romkatolika Eklezio, kiu estas ĉefa.

AFRIKO - KATOLIKA ĈEESTO. En Afriko vivas pli ol 42 milionoj da katolikoj kaj 17.180 sacerdotoj, inkluzive de indiĝenoj kaj eksterlandanoj. En la ciferoj, entenataj en dokumentaro publikigita de la Asocio de la Episkopaj Konferencoj de orienta Afriko, estas reliefigite, ke la plej granda nombro da katolikoj vivas en Zairio (proksimume 8 milionoj el 23 milionoj da loĝantoj), dum la plej malgranda katolika komunumo estas tiu de Somalio, kun 2.623 fideluloj el 3 milionoj da loĝantoj. Koncerne la klerikaron Zairio estas ankaŭ la lando kun la plej granda nombro da misiistoj: 2.187.

ANGOLO - LUANDO. Invito por preĝi senĉese por la paco en Angolo adresis la episkoparo al ĉiuj sacerdotoj, fratinoj kaj fideluloj de tiu lando. La episkopoj, konklude de sia lasta ĝenerala kunveno en Luando, interalie rekomendis al la klerikaro kaj al ĉiuj fari specialajn preĝojn por la paco dum la celebrado de ĉiu meso, reciti la rozarion kun la celo petegi de la Madono la donon de la paco, kaj, fine, senĉese instigi la kristanajn komunumojn klopodi labori por la paco laŭ siaj eblecoj por konstrui pli bonan Angolon.

EBURBORDO - ABIĜANO. Katekezo kaj liturgio estis la ĉefaj temoj diskutitaj ĉe la Episkopa Konferenco de Eburio en la plena asembleo. En liturgia kampo la kunvenintoj publikigis dokumenton pri la aplikado de la reformo je paroka nivelo. La episkopa noto atentigas kontraŭ eblaj malcentriĝoj en la disvolvo de la ritoj. La episkopoj, krome, alfrontis la problemon de la administra kaj financa aŭtonomeco de iu loka virina kongregacio: la Fratinoj de Nia Sinjorino de la Paco. La instituto, havanta hodiaŭ 11 religiulinojn kun ĉiamdaŭraj votoj, 57 kun portempa daŭro, kaj 18 novicinojn, sin dediĉas al la evangelizado kaj al la evoluigado de la amasoj kamparaj kaj urbaj.

ETIOPIO - ADISABEBO. Ekfunkcias jam la centro por formado de katekistoj en la apostola prefektejo de Avaso en Etiopio. La centro estas malfermita al la kandidatoj de la diocezoj de la suda Etiopio. La tuto konsistas el preĝejo, lernoĉambroj por la katekistoj kaj laborejoj por iliaj edzinoj; 16 domoj por samtiom da familioj kaj la loĝejoj por la sacerdotoj kaj la monakinoj zorgantaj pri la centro. La konstruado de la kuraĝa entrepreno estas financata de katolikaj organizaĵoj svisaj kaj germanaj. Direktoro de la centro estas la misiisto Patro Migliorati, kiu pretiĝis al sia tasko frekventante specialan kurson ĉe paŝtista instituto de Ugando.

LIBIO - TRIPOLO. Kristana ekumenismo. La ĉeesto de la kristanoj en ĉi tiu lando estas hodiaŭ ligita al la internacia teknika kunlaborado postulata de la registaro. Ĉi tiu renkontiĝo de kunlaborantoj okcidentaj, afrikaj kaj aziaj, kun la neevitebla komparo de religieco, vekas en multaj homoj la konkretan deziron de unueco inter la kristanoj de la diversaj konfesioj. La Eklezioj oficiale rekonataj de la libia registaro estas la greka ortodoksa, la kopta ortodoksa kaj la katolika. Ofte kato-

likoj kaj ortodoksoj miksiĝas en la respektivaj ejoj de kulto. La manko de la sacerdoto aŭ de la diservisto faligas iujn barilojn pli teoriajn ol konkretajn, helpante la fidelulojn al la interkompreniĝo.

En Benghazi pliiĝis nunjare pakistana komunumo, al kiu apartenas ankaŭ kelkaj katolikoj kaj anglikanoj. Ne sciante kie kaj kiel kuniĝi por preĝi, ili ricevis de la monakinoj de la hospitalo El-Gomhoria la permeson uzadi ilian kapelon. Tiel la katolika sacerdoto interesiĝas pri ĉi tiu malgranda komunumo pakistana.

RVANDO - KIGALO. Estinteco, nuntempo kaj estonteco de la Eklezio en Rvando: estas la temo de paŝtista letero de la rvanda episkoparo okaze de la 75a datreveno de la alveno de la unuaj misiistoj al la Lando. La dokumento skizas historion pri ĉi tiuj tri kvaronoj da jarcento da intensa agado misiista kaj paŝtista. Poste ĝi pritraktas la unuan situacion de la Eklezio en Rvando, kun profunda esploro de la problemoj plej aktualaj kaj urĝaj. La lasta parto de la letero, fine, indikas la direktivojn de la estonta paŝtista agado kun aparta rilato al la kunlaborado inter civilaj kaj religiaj aŭtoritatoj, celanta la integran evoluon de la rvandanoj. La episkopoj, ĉe la konkludo de la dokumento, esprimas deziron, ke en la estonteco la homaj kaj moralaj valoroj de la kulturo de Rvando integriĝu en kristanismo renovigita kaj dinamisma kaj invitas la tutan popolon de Dio al grandanima kunlaboro interne de la Eklezio de Kristo.

UGANDO - ARUA. La episkopo de la diocezo de Arua, Mons. Anĝelo Tarantino, donis al "Mama Cecilia", kiel ĉiuj ŝin nomas, la medalon "Pro Ecclesia et Pontifice", kiel signo de danko pro ŝiaj 50 jaroj da servado al la Eklezio. Partoprenis en la kortuŝa ceremonio amaso da kristanoj kunvenintoj el ĉiuj partoj de Ugando kaj ĉiuj lokaj civilaj kaj religiaj aŭtoritatoj.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo